
*La alia silabenigmo*

Po du trisilabaj vortoj havas komunan mezan silabon, kiun vi mem devas trovi. El tiuj lauvice legate formigos frazo de Benjamin Franklin, kiu intertempe farigis proverbo.

Jen la 24 silaboj: bro do fan hejm hu ka ko ko kom mo no po pra ro ro sep si sip te ter to to to tro



1 – 13 monato 2 – 14 historia periode 3 – 15 nutrajo 4 – 16 deserto el fruktoj 5 – 17 tagmeza pauzo en sudaj landoj 6 – 18 kapitano 7 – 19 laboro de gelernantoj post la lerneja tempo 8 – 20 literatura genro de super-naturaj estajoj 9 – 21 meblo 10 – 22 stato de la temperamento 11 – 23 milita pafilo 12 – 24 alta vira kantvoco

*Solvo de la julia enigmo:*

horizontale: 1 ora 4 agi 6 pomo 7 ili 8 sub 11 kat' 13 damo 14 metal' 15 mono
Vertikale: 1 opio 2 rol' 3 amik' 5 gru' 8 stalo 9 bromo 11 Adam' 12. teo

**Konontaktu nin! Gun.Eb@t-online.de +493831 490003**

{



Se tuj ne igas verk',
ne estos morgau gi,
kaj ne preterlasu la tagon!
La verkon faru per decid',
kurage do veku la agon!

lau Johann Wolfgang von Goethe

{

## Anekdoto pri Diogenes

Diogenes iam postulis al la konsilantaro de la maljunuloj en Ateno, gi dekretu, ke oni ciujn azenojn deklaru al cevaloj. "Kial tio?", li estis demandata. "Por kasi la honton, ke ni estas regataj de nuraj azenoj", redonis Diogenes.

## Nia longa vojago al UK en Vilno

**Cijare mi decidis ne kiel kutime vjagi per aviadilo al UK, sed per propra automobilo. Anstatau iu ajn antau –au postkongresa ekskurso mi volis konatigi kun nia najbarlando.**

**Do, je la 19a de julio mi frumatene ekveturis komence al Prenzlau por kunvojagigi Edeltraut-on kaj tagmeze ni atingis la domon de nia pola amiko Janusz en Stargard. Post abunda**

tagmango ni komencis nian komunan vojon. Nur mallonge ni povis resti en mia naskigurbo Wa³cz, car ni nepre volis atingi Bydgoszczon. Tie afable akceptis nin E-amikino Ela, kiu preparis al ni noktan restadon.

La venontan tagon ni uzis por viziti kelkajn historiajn vidindajojn survoje al Gdansk. Tre placcis al ni la bela urbo de Koperniko Torun kaj kompreneble la mondfama Maria-burgo en Malbork. Vespere ni estis je la celo de nia dua etapo en agrabla hotelo. Tie ni kontaktigis kun nia gdanska amikino Mira por interkonsenti pri la sekva tago.

En la parko de Oliwa okazis nia renkontigo kaj malgrau la pluva vetero ni promenis en la bela parko kaj auskultis orgenprezenton en la fama kirko. Poste ni vizitis la historian parton de Gdansk kaj travivis belajn horojn kun pianomuziko en la hejmo de Mira.

Je la 22a de julio ni daurigis la vojagon tra la mazura regiono al la iama vojvodia urbo Suwa³ki. Survoje ni preterpasis la klostron de Sankta Tilio kaj haltis por fari belan foton.

La 23a de julio jam estis la unua tago de la UK. Do, ni pluiris, sed ni uzis la eblecon denove viziti vidindajon, la klostron de Wigry en bela lagoregiono. La kongreso mem okazis lau la kutima programo kun kulturaj kaj sciencaj arangoj kaj belegaj ekskursoj al Kaunas, Trakaj kaj orientlituva nacia parko.

Post la fino de la UK ni vizitis la polan cefurbon dum belega vetero. Ni restis du tagojn kaj klopodis vidi tiel multe kiel eblas kaj Janusz ege helpis nin, car li bone konas la urbon.

Venis la fino de nia ekskurso kaj denove ni atingis la domon de Janusz. Tie ni trovis agrablan tranoktejon, car por tuja pluveturo mi estis tro laca. Tiel ni finfine havis la eblecon ankau viziti la gemelurbon de Stralsund antau ol ni reveturis je la 3a de augusto.

Mi ne scias, cu mi iam denove entreprenos similan, sed oni ja neniam diru “ne”.

Tiel ankau la 90a UK farigis neforgesebla travivajo kaj mi dankas al ciuj, kiuj helpis al tio.

Gunter

{

## *La lastaj aferoj*

Je la 20a de augusto okazis la cijara gardenfesto ce Werner en Pragsdorf. Dum belega vetero kunvenis la esperantistoj de la Neubrandenburga E-asocieto kun tri Stralsundanoj kaj travivis belajn horojn. Dankon al Brunjo jaj Werner.

## *La venonta afero*

La Stralsunda grupeto renkontigos denove je la 14a de septembro , 14:30h, en Parow, Straße am Sund 1.